



# **La Brusto-Plato de la Judo**

**de Arthur Conan Doyle**

**el la angla tradukis  
James Alan Smith**

## La Brusto-Plato de la Judo

Mia speciala amiko, Ward Mortimer, estis siatempe unu el la plej elstaraj spertuloj pri orienta arkeologio. Li verkis vaste pri la temo, li loĝis dum du jaroj en tombo en Tebo, dum li elkavigadis en la Valo de la Reĝoj, kaj fine li kreis ne malgrandan sensacion per la eltombigado de la laŭdira mumio de Kleopatra en la interna ĉambro de la Templo de Horuso en Fileo. Pro tiuj multaj atingoj je la aĝo de nur tridek unu jaroj, ŝajnis ke sufiĉe impona kariero staras antaŭ li, kaj neniŭ estis surprizita kiam li estis elektita al la posteno de kuratoro de Muzeo Strato Belmore, kiu kunportis la postenon de preleganto en Orienta Kolegio kaj salajron kiu, kvankam ĝi malpliigis pro la senvalorigado de tero, restis je tiu ideala sumo kiu estas sufiĉe granda por kuraĝigi esploranton sed ne tiel granda ke ĝi debiligus lin.

Estis nur unu faktoro kiu faris lian postenon en Muzeo Strato Belmore iomete malfacila, kaj tio estis la ekstrema eminenteco de lia antaŭulo. Profesoro Andreas estis profunda klerulo kaj homo kun eŭropa reputacio. Liajn prelegojn frekventis studentoj de ĉiu parto de la mondo, kaj lia admirinda estrado de la kolekto konfidita al lia zorgado estis bone konata en ĉiuj kleraj societoj. Estis do granda surprizo kiam, je aĝo de kvindek kvin jaroj, li subite demisiis de la posteno kaj forlasis tiujn devojn kiuj estis kaj lia vivtenilo kaj lia plezuro. Li kaj lia filino forlasis la komfortan ĉambraron kiu konsistigis lian formalan rezidejon ligitan al la muzeo, kaj mia amiko, Mortimer, kiu estis fraŭlo, enloĝiĝis tie.

Aŭdinte pri la nomado de Mortimer, Profesoro Andreas skribis al li tre bonkoran kaj flatan leteron de gratulado. Mi eĉ ĉeestis ilian unuan renkontiĝon, kaj mi iris kun Mortimer ĉirkaŭe en la muzeo kiam la profesoro montris al ni la admirindan kolekton kiun li dorlotis tiel longe. La bela filino de la profesoro kaj juna viro, Kapitano Wilson, baldaŭ estonta, laŭ mia kompreno, ŝia edzo, akompanis nin dum nia ekzamenado. Estis dek kvin ĉambroj, sed la babilona, la siria, kaj la centra halo, kiu entenis la judan kaj egiptan kolekton, estis la plej fajnaj el ĉiuj. Profesoro Andreas estis kvieta, senemocia, maljuna viro, kun senbarba vizaĝo kaj senpasia maniero, sed liaj nigraj okuloj briletis kaj liaj trajtoj entuziasme vigliĝis kiam li atentigis nin pri la rareco kaj la beleco de kelkaj liaj specimenoj. Lia mano restetis tiel ameme super ili ke oni povis vidi lian fierecon pri ili kaj la malĝojon en lia koro nun kiam ili pasis de lia zorgo al alies.

## La Brusto-Plato de la Judo

Li montris al ni laŭvice siajn mumiojn, siajn papirusojn, siajn rarajn skarabojn, siajn surskribaĵojn, siajn judajn relikvojn, kaj sian kopion de la fama sepbranĉa kandelabro de la templo, kiun portis al Romo Tito kaj kiu, laŭ la opinio de kelkaj, ĝuste en ĉi tiu momento kuŝas sur la bedo de Tiberio. Poste li proksimiĝis al montrokesto kiu staris ĝuste en la mezo de la halo, kaj li rigardis malsupren tra la vitro kun respekto en atitudo kaj mieno.

“Ĉi tio ne estas novaĵo al spertulo kiel vi, S-ro Mortimer”, diris li, “sed probable al via amiko, S-ro Jackson, estus interese vidi ĝin”.

Kliniĝante super la kesto, mi vidis objekton, kvadratan je flankoj de ĉirkaŭ kvin koloroj, kiu tenis dek du gemojn en framo el oro, kun oraj kroĉiloj ĉe du anguloj. La gemoj estis ĉiuj diversaj laŭ speco kaj koloro, sed ili estis same grandaj. Iliaj formoj, aranĝo, kaj gradiĝo de kolor-nuancoj pensigis min pri skatolo de akvarelofarboj. Ĉiu gemo havis ian hieroglifon gravuritan sur sia surfaco.

“Ĉu vi jam aŭdis, S-ro Jackson, pri la *Urim* kaj *Tummim*?”

Mi aŭdis la terminon, sed mia ideo pri ĝia signifo estis treege svaga.

“La *Urim* kaj *Tummim* estis nomo donita al la ora plato kiu kuŝis sur la brusto de la alta pastro de la judoj. Ili havis specialan senton de respekto pri ĝi—ian similan al la sento kiun havis antikva romiano pri la sibilaj libroj en Kapitulo. Estas, kiel vi vidas, dek du gemoj, gravuritaj per mistikaj signoj. De la maldekstra, supra angulo ili estas karneolo, peridoto, smeraldo, rubeno, lazurito, onikso, safiro, agato, ametisto, topazo, berilo, kaj jaspo”.

Mi miris pri la diverseco kaj beleco de la gemoj.

“Ĉu la brustoplato havas apartan historion?” mi demandis.

“Ĝi estas antikvega kaj valorega”, diris Profesoro Andreas. “Kvankam ni ne povas fari absolutajn asertojn, ni havas multajn kialojn por kredi ke estas eble ke ĝi estas la originala *Urim* kaj *Tummim* de la Templo de Salomono. Certe ne ekzistas io tiel fajna en iu ajn kolekto en Eŭropo. Ĉi tiu mia amiko, Kapitano Wilson, estas praktika aŭtoritatulo pri gemoj, kaj li dirus al vi kiel puraj estas ĉi tiuj”.

## La Brusto-Plato de la Judo

Kapitano Wilson, viro kun malhela, dura kaj penetranta vizaĝo, staris apud sia fianĉino je la alia flanko de la kesto.

“Jes”, li diris abrupte, “mi neniam vidis pli fajnajn gemojn”.

“Kaj ankaŭ la ora laboraĵo estas atentinda. La antikvuloj estis eminentaj en...”, kaj li ŝajne intencis atentigi pri la muntumo de la gemoj, sed Kapitano Wilson interrompis lin.

“Vi vidis pli fajnman ekzemplon de ilia prilaborado de oro en ĉi tiu kandellabro”, diris li, turniĝante al alia tablo, kaj ni ĉiuj kuniĝis kun li en admirado de ĝia reliefigita fusto kaj delikate ornamitaj branĉoj. Sume, estis interesa kaj nova sperto aŭdi klarigojn pri objektoj tiel raraj de tiel granda spertulo; kaj kiam, fine, Profesoro Andreas finigis nian ekzamenadon per formala transdono de la karega kolekto al la zorgado de mia amiko, mi ne povis ne kompati lin kaj envii lian anstataŭanton kies vivo pasos kun tiel agrabla devo. Interne de semajno, Ward Mortimer enloĝiĝis en sia nova ĉambraro kaj fariĝis la aŭtokrato de Muzeo Strato Belmore.

Ĉirkaŭ du semajnojn poste mia amiko aranĝis malgrandan vespermanĝon por ses fraŭlaj amikoj por festi lian promocion. Dum liaj gastoj foriris li tiretis mian manikon kaj signalis al mi ke li volas ke mi restu.

“Via vojo estas nur kelkcentmetra”, diris li—mi loĝis en ĉambraro en la rezidejo Albany. “Vi restu kaj fumu cigaron kun mi en trankvilo. Mi tre avidas vian konsilon”.

Mi refalis en fotelon kaj bruligis unu el liaj bonegaj cigaroj Matronas. Kiam li revenis de akompanado de la fina gasto al la pordo, li tiris leteron el sia jakto kaj sidiĝis fronte al mi.

“Ĉi tio estas anonima letero kiun mi ricevis hodiaŭ matene”, diris li. “Mi volas legi ĝin al vi kaj havi vian konsilon”.

“Mi volonte donos ĝin al vi, sed mi ne scias kiom ĝi valoros”.

“La letero tekstas jene: ‘Sinjoro - Mi volus forte konsili al vi ke vi tre zorge gardu la multajn valorajn objektojn konfiditajn al via estrado. Mi ne opinias ke la ekzistanta sistemo de unu sola gardisto

## La Brusto-Plato de la Judo

estas sufiĉa. Estu singarda, aŭ eble okazos nerebonigebla misfortuno.”

“Ĉu tio estas ĉio?”

“Jes, tio estas ĉio”.

“Nu”, diris mi, “estas almenaŭ evidente ke ĝin skribis unu el la limigita nombro da personoj kiuj scias ke vi havas nur unu gardiston en la nokto”.

Ward Mortimer donis al mi la leteron kun kurioza rideto. “Ĉu vi bone perceptas manskribaĵojn?” diris li. “Nu, rigardu ĉi tion!” Li metis alian leteron antaŭ mi. “Rigardu la *c* de 'congratulate' kaj la *c* de 'committed.' Rigardu la majuskulan *I*. Atentu la originalaĵon uzi strekon anstataŭ punkto!”

“Ilin sendube skribis la sama persono, sed la unuan oni penis iom ali-aspektigi”.

“La dua”, diris Ward Mortimer, “estas la letero de gratulado skribita al mi de Profesoro Andreas kiam mi ricevis la postenon”.

Mi fikse rigardis lin kun mirego. Tiam mi renversis la leteron en mia mano, kaj jen, tute certe, estis skribita sur la alia flanko “Martin Andreas”. Ne povus estis ia dubo en la menso de iu ajn kiu havas la plej malmultan scion pri la scienco de grafologio, ke la profesoro skribis anoniman leteron, avertantan sian anstataŭanton pri ŝtelistoj. Estis ne klarigeble, sed estis certe.

“Kial li farus tion?” mi demandis.

“Precize tion mi volus demandi al vi. Se li havis ian ajn tian dubon, kial li ne povus veni kaj diri tion al mi rekte?”

“Ĉu vi parolos al li pri tio?”

“Jen denove mi havas dubojn. Li eble elektos negi ke li skribis ĝin”.

“Ĉiuokaze”, diris mi, “ĉi tiu averto estas amika laŭ intenco, kaj mi

## La Brusto-Plato de la Judo

certe agus pro ĝi. Ĉu la nunaj antaŭzorgoj sufiĉas por protekti vin kontraŭ rabado?”

“Mi estus pensinta ke jes. La publiko rajtas enveni nur de la deka ĝis la kvina, kaj estas gardisto por ĉiuj du ĉambroj. Li staras ĉe la pordo inter la du kaj tiel povas observi ambaŭ”.

“Sed nokte?”

“Kiam la publiko forestas, ni tuj starigas la grandajn, ferajn ŝirmilojn, kiuj estas absolute imunaj kontraŭ ŝtelistoj. La gardisto estas kompetenta homo. Li sidadas en la gardistejo, sed li faras rondon je ĉiu tria horo. Ni briladigas unu elektran lumilon en ĉiu ĉambro dum la tuta nokto”.

“Estas malfacile sugesti ion pli—krom retenado de la taga aranĝo por la tuta nokto”.

“Ni ne povus elporti la koston de tio”.

“Almenaŭ mi komunikus kun la polico kaj aranĝus por speciala konstablo ekstere sur Strato Belmore,” diris mi. “Pri la letero, se la skribinto volas esti anonima, mi kredas ke li rajtas resti tia. Ni devas fidi ke la estonteco montros ian kialon por la kurioza vojo kiun li elektis”.

Tiel ni forlasis la temon, sed dum tiu tuta nokto post reveno al mia ĉambraro mi cerbumegis pri kio povus esti la motivo de Profesoro Andreas skribi anoniman leteron de averto al sia anstataŭinto—ĉar ke la manskribo estis lia estis tiel certe al mi kvazaŭ mi vidus lin tion fari. Li antaŭvidis ian danĝeron al la kolekto. Ĉu li forlasis zorgadon de ĝi pro antaŭvido de tio? Sed, se jes, kial li hezitus averti Mortimer en sia propra nomo? Mi daŭre cerbumadis ĝis mi endormiĝis maltrankvile, kaj dormis preter mia kutima horo de vekigo.

Mi estis vekita laŭ kurioza kaj efika maniero, ĉar ĉirkaŭ la naŭa mia amiko, Mortimer, enhastis en mian ĉambraron kun esprimo de konsterniĝo sur la vizaĝo. Li estis kutime unu el la plej persone ordemaj viroj kiujn mi konis, sed nun lia kolumo estis malfiksita je unu ekstremo, lia kravato flirtis, kaj lia ĉapelo estis sur la malantaŭo de lia kapo. Mi legis la tutan rakonton en liaj frenezaj okuloj.

## La Brusto-Plato de la Judo

“Oni prirabis la muzeon!” mi kriis, eksidante en la lito.

“Mi timas ke jes! Tiuj juveloj! La juveloj de la *Urim* kaj *Tummim!*” li eldiris bruspire, ĉar li anhelis pro kurado. “Mi iras al la policejo. Venu al la muzeo kiel eble plej baldaŭ, Jackson! Ĝis!” Li rapidis disatente el la ĉambro, kaj mi aŭdis lin klakadi malsupren laŭ la ŝtuparo.

Mi ne malfruiĝis en sekvado de liaj instrukcioj, sed kiam mi alvenis mi trovis, ke li jam revenis kun inspektoro de la polico kaj alia iom maljuna sinjoro, kiu estis, kiel mi sciiĝis, S-ro Purvis, unu el la partneroj de Morson kaj Kompanio, la bone konataj komercistoj de diamantoj. Kiel spertulo pri gemoj li estis ĉiam preta konsili la policon. Ili grupiĝis ĉirkaŭ la kesto en kiu la brustoplato de la juda pastro estis elmontrata. La plato estis eligita kaj metita sur la vitran supron de la kesto, kaj la tri kapoj kliniĝis super ĝi.

“Estas evidente ke iu fi-manipulis ĝin”, diris Mortimer. “Ĝi frapis mian okulon tuj kiam mi pasis tra la ĉambro hodiaŭ matene. Mi ekzamenis ĝin hieraŭ vespere, estas do certe ke tio okazis dum la nokto”.

Estis, kiel li diris, evidente, ke iu laboradis super ĝi. La muntumoj de la supra vico—la karneolo, peridoto, smeraldo kaj rubeno—estis malglataj kaj noĉitaj kvazaŭ iu gratis tute ĉirkaŭe de ili. La gemoj estis en siaj lokoj, sed la bela oraĵo kiun ni admiris antaŭ nur malmultaj tagoj estis tre mallerte tiritadita.

“Ŝajnas al mi”, diris la inspektoro de polico, “kvazaŭ iu penis eltiri la gemojn”.

“Mia timo estas”, diris Mortimer, “ke li ne nur penis, sed sukcesis. Mi kredas ke ĉi tiuj gemoj estas lertaj kopioj kiujn oni enmetis anstataŭ la originalaj”.

La Sama suspekto verŝajne estis en la menso de la spertulo, ĉar li jam zorge ekzamenadis la kvar gemojn helpe de lupeo. Li nun elmetis ilin al pluraj provoj kaj fine turniĝis kontente al Mortimer.

“Mi gratulas vin, sinjoro”, li diris entuziasme. “Mi garantios per

## La Brusto-Plato de la Judo

mia reputacio, ke ĉiuj tiuj kvar gemoj estas aŭtentikaj, kaj de eksterordinara grado de pureco”.

La tima vizaĝo de mia povra amiko komencis reakiri sian koloron, kaj li enspiregis pro senĉagreniĝo.

“Dank’ al Dio!” li kriis. “Sed kion en la tuta mondo celis la ŝtelisto?”

“Probable li intencis preni la gemojn, sed io interrompis”.

“En tiu okazo oni atendus ke li elprenos ilin unuope, sed la muntumo de ĉiu estas lozigitaj kaj la gemoj estas ĉiuj ĉi tie”.

“Certe estas eksterordinare”, diris la inspektoro. “Mi ne memoras similan kazon. Ni parolu kun la gardisto”.

Oni alvokis la gardiston—soldateca, honestvizaĝa viro kiu ŝajnis same ĉagrenita kiel Ward Mortimer pro la afero.

“Ne, sinjoro, mi ne aŭdis eĉ unu sonon”, li respondis al la demando de la inspektoro. “Mi faris miajn rundojn kvar fojojn, kiel kutime, sed mi vidis nenion suspektigan. Mi jam deĵoris ĉi tie dek jarojn, sed nenio tia okazis iam ajn antaŭe”.

“Ŝtelisto ne povus veni tra la fenestro, ĉu?”

“Neeble, sinjoro”.

“Aŭ pasi vin ĉe la pordo?”

“Ne, sinjoro. Mi neniam foriris de mia posteno krom kiam mi piediris laŭ miaj rundoj”.

“Kiaj aliaj aperturoj estas en la muzeo?”

“Estas la pordo al la privataj ĉambroj de S-ro Mortimer”.

“Tio estas ŝlosita dum la nokto”, klarigis mia amiko, “kaj por atingi ĝin, iu de la strato devus malfermi ankaŭ la eksteran pordon”.

“Pri viaj servistoj?”



## La Brusto-Plato de la Judo

“Iliaj loĝejoj estas tute apartaj”.

“Nu, nu”, diris la inspektoro, “ĉi tio estas ja obskura. Tamen trafis nenia malbono, laŭ S-ro Purvis”.

“Mi ĵuros ke ĉi tiuj gemoj estas aŭtentikaj”.

“La afero saĝne temas do nur pri malica difektado. Tamen mi tre volonte iros zorge ĉirkaŭe en la lokalo por vidi ĉu mi povos trovi ian ŝpuron kiu sciigos al ni kiu eble estis via vizitanto”.

Lia esplorado, kiu daŭris la tutan matenon, estis zorga kaj inteligenta, sed ĝi fine kondukis al nenio. Li atentigis al ni ke estas du eblaj envenejoj en la muzeon kiujn ni ne konsideris. Unu estis de la kelo tra klapo en la pasejo. La alia tra lukso de la subtegmento, super ĝuste tiu ĉambro al kiu la invadinto penetris. Ĉar ŝtelisto povis eniri nek en la kelon nek en la subtegmonton se li ne estis jam interne de la ŝlositaj pordoj, la afero ne estis praktike grava, kaj la polvo de la kelo kaj de la subtegmento konvinkis nin ke neniu uzis aŭ unu aŭ la alian. Fine, ni finiĝis kiel ni komencis, sen la plej malgranda indico pri kiel, kial aŭ de kiu la muntumo de tiuj kvar gemoj estis manipulita.

Restis nur unu vojo por Mortimer kaj li sekvis ĝin. Lasante la policon al siaj senfruktaj esploroj, li petis ke mi akompanu lin tiun posttagmezon en vizito al Profesoro Andreas. Li portis kun si la du leterojn, kaj estis lia intenco malkaŝe akuzi sian antaŭulon, ke li estas la skribinto de la anonima averto kaj peti ke li klarigu la fakton ke li antaŭsciis tiel precize tion kio efektive okazis. La profesoro vivis en malgranda vilao en Upper Norwood, sed servistino diris al ni ke li estas for de la domo. Vidante nian desapontiĝon, ŝi demandis ĉu plaĉus al ni vidi F-inon Andreas, kaj kondukis nin en la modestan salonon.

Mi jam menciis preterpasante, ke la filino de la profesoro estis tre bela junulino. Ŝi estis blonda, alta kaj gracia, kun haŭto de tiu delikata kolor-nuanco kiun la francoj nomas "*mat*", la koloro de malnova eburo, aŭ de la pli palaj petaloj de la flava rozo. Ŝokis min, tamen, kiam ŝi envenis en la ĉambron, vidi kiel multe ŝi ŝanĝiĝis en la pasintaj du semajnoj; ŝia juna vizaĝo estis lacega kaj ŝiaj brilaj okuloj estis malviglaj pro ĉagreno.

## La Brusto-Plato de la Judo

“Patro foriris al Skotlando”, ŝi diris. “Li saĝnas laca, kaj sufc̃e multe ĉagrenas lin. Li foriris de ni nur hieraŭ”.

“Vi mem ŝajnas iomete laca, F-ino Andreas”, diris mia amiko.

“Mi estis tiel maltrankvila pri Patro”.

“Ĉu vi povas diri al mi lian skotan adreson?”

“Jes, li estas kun sia frato, Pastro David Andreas, 1 Arran Villas, Ardrossan”.

Ward Mortimer faris noton pri la adreso, kaj ni foriris sen diri ion pri la celo de nia vizito. Ni troviĝis en Strato Belmore vespere en precize la sama situacio en kiu ni estis en la mateno. Nia sola indico estis la letero de la profesoro, kaj mia amiko jam decidis ekiri al Ardrossan la sekvontan tagon kaj finesplori pri la anonima letero kiam nova disvolvajo ŝanĝis niajn planojn.

Tre frue la sekvantan matenon mi estis eldormigita per frapeto sur la pordo de mia litĉambro. Estis sendito kun noto de Mortimer.

“Bonvolu alveni”, ĝi diris; “la afero fariĝas pli kaj pli eksterordinara”.

Kiam mi obeis la alvokon, mi trovis lin paŝanta ekscitate tien kaj tien en la centra halo dum la maljuna soldato kiu gardis la lokalon staris kun militista rigideco en angulo.

“Ha, Jackson”, li kriis, “tre plaĉas al mi ke vi venis, ĉar ĉi tio estas ja neklarigebla afero”.

“Kio okazis do?”

Li mangestis al la kesto kiu entenis la brustoplaton.

“Rigardu ĝin”, diris li.

Mi tion faris kaj ne povis reteni mian surprizon. La muntumo de la meza vico de gemoj estis profanita en la sama maniero kiel la supra. El la dek du gemoj. ok nun estis manipulitaj en tiu kurioza maniero.

## La Brusto-Plato de la Judo

La muntumo de la kvar malsupraj estis neta kaj glata. La aliaj noĉitaj kaj neregulaj.

“Ĉu la gemoj estis ŝanĝitaj?” mi demandis.

“Ne, mi certas ke la superaj kvar estas la samaj kiujn la spertulo deklaris aŭtentikaj, ĉar mi observis hieraŭ tiun malgrandan miskoloraĵon sur la rando de la smeraldo. Ĉar oni ne eltiris la suprajn gemojn, ne estas kialo kredi ke oni anstataŭis la malsuprajn. Vi diras ke vi aŭdis nenion, Simpson, ĉu ne?”

“Ne, sinjoro”, respondis la gardisto. “Sed kiam mi faris la rundojn post tagiĝo mi rigardis aparte ĉi tiujn gemojn kaj mi ekvidis tuj ke iu enmikiĝsis kun ili. Tiam mi vokis vin, sinjoro, kaj informis vin. Mi iris tien kaj tien dum la tuta nokto, kaj mi neniam vidis iun aŭ aŭdis sonon”.

“Venu supren kaj matenmanĝu kun mi”, diris Mortimer, kaj li kondukis min en sian ĉambraron. “Kion vi nun *pensas* pri tio”, li demandis.

“Tio estas la plej sencela, senutila, idiota afero pri kio mi iam ajn aŭdis. Tio ne povas esti alia ol la laboro de monomaniulo”.

“Ĉu vi povas proponi ian teorion?”

Kurioza ideo trafis mian kapon. “Ĉi tiu objekto estas juda relikvo de granda antikveco kaj sankteco”, diris mi. “Kion pri la antisemita movado? Ĉu oni povus imagi ke fanatikulo tiel pensanta eble profanus...”

“Ne, ne, ne!” kriis Mortimer. “Tio tute ne validas! Tia homo eble sekvus sian lunatikecon al la ekstremo detrui judan relikvon, sed kial diable li rongus ĉirkaŭe de ĉiu gemo tiel zorge ke li povas labori super nur kvar gemoj en unu nokto? Ni bezonas pli bonan solvon ol tio, kaj ni mem devas eltrovi ĝin, ĉar mi ne kredas ke nia inspektoro probable helpos nin. Unue, kion vi pensas pri Simpson, la gardisto?”

“Cu vi havas kialon suspekti lin?”

“Nur ĉar li estas la sola persono en la lokalo”.

## La Brusto-Plato de la Judo

“Sed kial li farus tiel malican detruon? Oni forportis nenion. Mankas al li motivo”.

“Ĉu manio?”

“Ne, mi ĵuros pri lia mensa sano”.

“Ĉu vi havas ian ajn alian teorion?”

“Nu, vi mem, ekaemple. Ĉu vi eble estas sonambulo?”

“Tute ne. KREDU al mi”.

“Mi rezignas do”.

“Sed mi ne, kaj mi havas planon per kio ni klarigos ĉion”.

“Ĉu viziti Profesoron Andreas?”

“Ne, ni trovos nian solvon pli proksime ol Skotlando. Mi diros al vi kion ni faru. Ĉu vi konas tiun lukon kiu superas la centran halon? Ni lasos ŝaltitaj la elektraĵn lumilojn en la halo, kaj ni gvatos de la subtegmento, vi kaj mi, kaj ni mem solvos la misteron. Se nia mistera vizitanto laboras super kvar gemoj ĉiun fojon, restas al li kvar por fari, kaj treege probable li revenos hodiaŭ nokte kaj finos la laboron”.

“Bonege!” mi kriis.

“Ni gardos nian propran sekreton kaj diros nenion aŭ al la polico aŭ al Simpson. Ĉu vi venos kun mi?”

“Kun plej granda plezuro”, diris mi; kaj tiel ni konsentis.

Estis la deka de la nokto kiam mi revenis al Muzeo Strato Belmore. Mortimer estis, kiel mi povis vidi, en stato de retenata nerva ekscitiĝo, sed ankoraŭ estis tro frue por komenci nian vigladon. Ni restis do pli malpli unu horon en lia ĉambraro, diskutante la multajn eblojn de la kurioza afero kiun ni intencis solvi. Fine la roranta fluo de fiakroj kaj la susuro de hastantaj piedoj fariĝis pli mallaŭtaj kaj intermitaj dum la plezurerĉantoj pasis voje al la stacioj aŭ siaj

## La Brusto-Plato de la Judo

hejmoj. Estis preskaŭ la dekdua kiam Mortimer kondukis nin al la subtegmento kiu estis super la centra halo de la muzeo.

Li jam vizitis ĝin dum la tago, kaj li etendis iom da sakŝtofo tiel ke ni povis kuŝi komforte, kaj rigardi rekte malsupren en la muzeon. La luko ne estis el laktecigita vitro sed ĝi estis tiel kovrita de polvo ke estus neeble ke persono rigardante supren de malsupre rimarkus ke li estas observata. Ni purigis malgrandan lokon en ĉiu angulo, kio donis al ni kompletan vidon al la ĉambro malsupre de ni. En la malvarma, blanka lumo de la elektra lumiloj ĉio elstaris neta kaj klara, kaj mi povis vidi la plej malgrandajn detalojn de la enhavoj de la diversaj kestoj.

Tia viglado estas bonega leciono, ĉar oni devige rigardas atente tiujn objektojn kiujn ni kutime pasas kun tia manko de intereso. Mi pasigis la horojn studante ĉiun specimenon tra mia gvattrueto, de la enorma mumikesto kiu kliniĝis kontraŭ la muro al ĝuste tiuj gemoj kiuj venigis nin tien, brilantaj kaj scintilantaj en sia vitra kesto tuj sub ni. Estis multe da valoraj oraĵoj kaj multaj valoraj gemoj dislokitaj tra la multaj kestoj, sed tiuj mirindaj dek du kiuj konsistigis la *Urim* kaj *Tummim* briletis kaj ardis kun radianteco kiu vaste eklipsis la aliajn. Mi studis vice la tombajn bildojn de Sikara, la frisojn de Karnak, la statuojn de Menefro, kaj la surskribaĵojn de Tebo, sed miaj okuloj ĉiam revenis al tiu mirinda juda relikvo, kaj mia menso al tiu kurioza mistero kiu ĉirkaŭis ĝin. Mi vagis en pensado pri ĝi kiam mia kunulo subite, akute enspiris kaj kaptis mian brakon per konvulsia kroĉo. Sammomente mi vidis tion kio ekscitis lin.

Mi jam diris ke kontraŭ la muro—je la dekstra flanko de la pordo (la dekstra flanko laŭ nia vidpunkto, sed la maldeksta kiam oni envenas) staris granda mumikesto. Je nia neimagebla mirigo, ĝi lante malfermiĝadis. Laŭgrade, laŭgrade la kovrilo elsvingiĝis, kaj la nigra fendo kiu markis la aperturon fariĝis pli kaj pli vasta. Tiel leĝere kaj zorge tio estis farata ke la moviĝo estis preskaŭ neperceptebla. Poste, dum ni senspire observis ĝin, blanka, svelta mano aperis en la aperturo, puŝante flanken la farbitan kovrilon, poste alia mano, kaj fine vizaĝo—vizaĝo kiu estis familiara al ni ambaŭ, tiu de Profesoro Andreas. Ŝtele li elglitis el la mumikesto, kiel vulpo ŝteliranta el sia kuŝejo, kun la kapo turniĝanta senĉese dekstren kaj maldekstren, jen paŝante, jen paŭzante, jen paŝante denove, klasika ekzemplo de ruzemo kaj zorgemo. Unu fojon ia

## La Brusto-Plato de la Judo

bruo en la strato ekfaris lin senmova, kaj li staris aŭskultante, kun la orelo alturnita, preta resagi al la ŝirmejo malantaŭ li. Poste li iretatis denove antaŭen piedpinte, tre, tre leĝere kaj lante, ĝis li atingis la keston en la centro de la halo. Tie li tiris el sia poŝo ŝlosilaron, malŝlosis la keston, elprenis la judan brustoplaton, kaj, kuŝiginte ĝin sur la vitron antaŭ si, komencis labori super ĝi per ia speco de malgranda, briletanta instrumento. Li estis tiel rekte sub ni ke lia kliniĝinta kapo kovris lian laboron, sed ni povus diveni per la moviĝado de lia mano ke li finas la strangan mutiladon kiun li antaŭe komencis.

Mi povis konstati per la forta spirado de mia kunulo, kaj la tikado de la mano kiu ankoraŭ kroĉis mian pojnon, la furiozan indignecon kiu plenigis lian koron dum li vidis ĉi tiun vandalismon en la loko kie li plej malmulte povis atendi ĝin. Li, la viro mem, kiu antaŭ du semajnoj respektege klinis sin super ĉi tiu unika relikvo, kaj kiu neprigis en niaj mensoj ĝian antikvecon kaj sanktecon, nun okupis sin per ĉi tiu ofendega profanado. Estis neeble, nepenseble—tamen tie, en la blanka brilo de la elektra lumilo sub ni, estis tiu malhela figuro kun la kliniĝinta griza kapo kaj la tikanta kubuto. Kia nehoma hipokriteco, kia malamplena profundo de malico kontraŭ lia anstataŭinto devas kuŝi sub ĉi tiuj fiaj, noktaj laboroj. Estis dolorige pensi pri tio, kaj terure observi ĝin. Eĉ mi, al kiu tute mankis la akutaj sentoj de virtuoza, ne povis toleri ke mi rigardu kaj vidu tiun intencan mutiladon de tiel antikva relikvo. Iomete senĉagrenigis mi ke mia kunulo tiritis mian manikon kiel signalo ke mi sekvu lin dum li leĝere paŝetis el la ĉambro. Nur post kiam ni estis en lia propra loĝejo li malfermis la lipojn, kaj tiam mi vidis en lia agitata vizaĝo kiel profunda estis lia konsterniĝo.

“La abomena vandalo!” li kriis. “Ĉu vi povus kredi?”

“Estas mirige”.

“Li estas kanajlo aŭ lunatiko—aŭ unu aŭ la alia. Ni tre baldaŭ vidos kiu. Venu kun mi, Jackson, kaj ni finsciigos pri ĉi tiu nigra afero”.

Pordo kondukis al la pasejo kiu estis la privata enirejo de lia ĉambraro en la muzeon. Ĉi tion li malfermis softe per sia ŝlosilo, unue forŝotinte la ŝuojn, laŭ kiu ekzemplo mi faris same. Ni lante iris kune tra ĉambro post ĉambro, ĝis la granda halo kuŝis antaŭ ni, kun la malhela figuro ankoraŭ kliniĝinta kaj laboranta ĉe la centra

## La Brusto-Plato de la Judo

kesto. Kun avanco tiel zorgema kiel lia ni proksimiĝis al li, sed kvankam ni iris tiel softe, ni ne povis tute surprizi lin. Ni estis malproksimaj ankoraŭ dudekon da metroj de li kiam li rigardis malantaŭen kun surprizo kaj, eligante raŭkan krion de teruro, kuris freneze tra la muzeo.

“Simpson! Simpson!” roris Mortimer, kaj malproksime laŭ la vicoj de pordoj kun elektrolumoj ni vidis subite aperi la rigidan figuron de la malnova soldato. Ankaŭ Profesoro Andreas vidis lin kaj ĉesis kuri, kun gesto de senesperigo. Sammomente ni ambaŭ metis manon sur lian ŝultron.

“Jes, jes, sinjoroj”, li diris anhele, “Mi venos kun vi. Al via ĉambraro, S-ro Ward Mortimer, mi petas! Mi sentas ke mi ŝuldas al vi klarigon”.

La indigno de mia kunulo estis tiel granda ke mi povis vidi ke li timas fidi sian kapablon regi sin se li replikus. Ni marŝis je ĉiu flanko de la maljuna profesoro, dum la miregigata gardisto sekvis. Kiam ni atingis la profanitan keston, Mortimer haltis kaj rigardis la brustoplaton. Jam unu el la gemoj de la malsupra vico suferis deflekson de la muntumo laŭ la sama maniero kiel la aliaj. Mia amiko eltenis ĝin kaj rigardis sian kaptiton furioze.

“Kiel vi povus?” li kriis. “Kiel vi povus?”

“Estas horore—horore!” diris la profesoro. “Ne surprizas min viaj sentoj. Venigu min al via ĉambro”.

“Sed ĉi tio ne restos sen ŝirmo!” kriis Mortimer. Li prenis la brustoplaton kaj portis ĝin tenere en la mano, dum mi piediris flanke de la profesoro kiel policano kun misfarinto. Ni pasis en la ĉambraron de Mortimer, lasante la mirigitan, maljunan soldaton al sia propra penado kompreni la aferon. La profesoro eksidis en la fotelo de Mortimer, kaj tiel terure paliĝis ke dum momento nia tuta rankoro fariĝis zorgemo. Glaso da forta brando revenigis vivon al li.

“Jen, mi pli bone fartas nun!” li diris. “La lastaj kelkaj tagoj estis tro multe por mi. Mi estas konvinkita ke mi ne povus elporti tion plu. Tio estis koŝmaro—horora koŝmaro—ke mi estus arestita kiel domŝtelisto en kio estis tiel longe mia propra muzeo. Kaj tamen mi ne rajtas kulpigi vin. Vi ne povus fari alie. Mia espero estis ĉiam ke

## La Brusto-Plato de la Judo

mi finos ĉion antaŭ ol mi estos rimarkita. Hodiaŭ nokte estus mia fma laboro”.

“Kiel vi envenis?” demandis Mortimer.

“Mi estis tro libera kun via privata pordo. Sed la celo justigis tion. La celo justigis ĉion. Vi ne koleros kiam vi scios ĉion—almenaŭ vi ne koleros kontraŭ mi. Mi havis ŝlosilon por via flanka pordo, kaj ankaŭ por la pordo de la muzeo. Mi ne transdonis ilin kiam mi foriris. Kaj vi vidis do ke ne estis malfacile por mi malfermi kaj enveni en la muzeon. Mi kutimis enveni frue, antaŭ ol la homamaso forlasis la straton. Post tio mi kaŝis min en la mumikesto, kaj rifuĝis tie kiam Simpson alvenis. Mi ĉiam povis aŭdi lin alveni. Mi eliris same kiel mi envenis”.

“Vi riskis multe”.

“Mi devis”.

“Sed kial? Kio en la mondo estis via celo—ke farus ion tian *vi!*” Mortimer indikis riproĉe la platon kiu kuŝis antaŭ li sur la tablo.

“Mi ne povis elpensi alian rimedon. Mi pensis kaj pensis, sed ne estis alternativo krom hida publika skandalo kaj privata doloro kiu mallumigus niajn vivojn. Mi agis por la plej bono, kvankam tio eble saĝos nekredbla al vi, kaj mi nur petas vian atenton por ebligi min pravi tion”.

“Mi aŭdos kion vi volas diri antaŭ ol mi agos plu”, diris Mortimer malgaje.

“Mi firme intencas kaŝi nenion kaj konfidi ĉion al vi ambaŭ. Mi lasos al via propra bonkoreco decidi kiel vi uzos la faktojn kiujn mi sciigos al vi”.

“Ni jam havas la esencajn faktojn”.

“Tamen vi komprenas nenion. Mi reiru al kio okazis antaŭ kelkaj semajnoj, kaj mi klarigos al vi ĉion. Kредu al mi ke tio kion mi diras estas la absoluta kaj preciza vero.



## La Brusto-Plato de la Judo

“Vi jam konatiĝis kun la persono kiu nomas sin Kapitano Wilson. Mi diras ‘nomas sin’ ĉar mi havas kialojn kredi nun ke tio ne estas lia ĝusta nomo. Kostus al mi tro multe da tempo se mi priskribus ĉiujn rimedojn per kiuj li aranĝis ke oni prezentu lin al mi kaj ke mi akceptu lin kiel amikon kaj ke li gajnu la favoron de mia filino. Li portis leterojn de alilandaj kolegoj kiuj devigis min iom atenti lin. Kaj poste, per siaj propraj atingoj, kiuj estas sufiĉe multaj, li sukcesis fari sin tre bonvena vizitanto en mia ĉambraro. Kiam mi sciiĝis ke li gajnis la koron de mia filino, mi eble pensis ke tio estas iom tro frua, sed certe ne surprizis min, ĉar li havis ĉarmon de maniero kaj konversacio kiuj farus lin elstara en iu ajn kunularo.

“Interesis lin multe orientaj antikvaĵoj, kaj lia scio pri la temo faris lian intereson komprenebla. Ofte kiam li pasigis la vesperon kun ni li petis permeson iri en la muzeon kaj havi oportunon private ekzameni la diversajn specimenojn. Vi povas imagi ke mi, adepto, simpatiis kun tia peto, kaj ke mi sentis nenian surprizon pri la konstanteco de liaj vizitoj. Post lia fakta fianĉiĝo kun Elise, apenaŭ estis vespero kiun li ne pasigis kun ni, kaj ĝenerale unu-du horoj estis dediĉitaj al la muzeo. Li estis tute libera en la muzeo, kaj kiam mi estis for dum la vespero mi ne kontraŭstaris ke li faros kion ajn li volos ĉi tie. Ĉi tiu stato de aferoj nur finiĝis pro la fakto de mia rezignado de miaj oficialaj devoj kaj mia emeritiĝo en Norwood, kie mi esperis havi libertempon por verki nemalgrandan libron kiun mi planis.

“Estis tuj post tio—interne de proksimume unu semajno—kiam mi komencis kompreni la ĝustan naturon kaj karakteron de la homo kiun mi tiel malprudente enlasis en mian familion. La ekscio venis al mi per leteroj de miaj eksterlandaj amikoj, kiuj montris al mi ke liaj leteroj de prezentado al mi estis falsitaj. Konsternite de la rivelado, mi demandis min kian motivon tiu homo povus originale havi kiam li faris tiun ellaboritan trompon al mi. Mi ne estis taŭga celo por ke serĉanto de riĉaĵoj marku min. Kial li venis do? Mi memoris ke kelkaj el la plej valoraj gemoj en Eŭropo estis sub mia estrado, kaj mi memoris ankaŭ la inĝeniajn pretekstojn per kiuj tiu homo sciiĝis pri la kestoj en kiuj ili estis tenataj. Li estis kanajlo kiu planis ian gigantan rabon. Kiel mi, sen afliktado al mia propra filino, kiu furoramis lin, povus malebligi ke li finfaru ian ajn planon kiun li eventuale formis? Mia rimedo estis mallerta, tamen mi ne povis elpensi pli efikan. Se mi skribus leteron sub mia propra nomo,

## La Brusto-Plato de la Judo

vi kompreneble petus de mi detalojn kiujn mi ne volis doni. Mi turnis min al anonima letero peteganta ke vi estu singarda.

“Mi diru al vi ke mia transloĝiĝo de Belmore al Norwood ne malplioftigis la vizitojn de tiu viro, kiu havis, laŭ mia kredo, realan kaj superantan senton de amo pri mia filino. Pri ŝi, mi ne povus kredi ke iu ajn virino povus esti tiel komplete sub la influo de viro kiel estis ŝi. Lia pli forta naturo ŝajne tute dominis ŝin. Mi ne komprenis kiel multe tio estis vera, aŭ la amplekson de la konfidencemo inter ili, ĝis ĝuste tiu vespero kiam lia vera karaktero unuafoje klariĝis al mi. Mi ordonis ke kiam li alvenos oni konduku lin al mia studejo anstataŭ al la salono. Tie mi diris al li malsubtile ke mi scias pri li, ke mi agis por malebligi liajn planojn, kaj, ke nek mi nek mia filino deziras iam ajn revidi lin. Mi aldonis ke mi dankas al Dio ke mi eltrovis lin antaŭ ol li havis tempon difekti tiujn valoregajn objektojn kies zorgo estis la laboro de mia vivo.

“Li certe estis viro de feraj nervoj. Li akceptis miajn rimarkojn sen signo de surprizo aŭ defio, kaj aŭskultis gravmiene kaj atente ĝis mi finis. Tiam li iris trans la ĉambron sen parolo kaj frapis la sonorilon.

“Petu al F-ino Andreas, ke ŝi bonvolu enveni,” li diris al la servistino.

“Mia filino envenis, kaj la viro fermis la pordon malantaŭ ŝi. Tiam li prenis ŝian manon en sian.

“‘Elise,’ diris li, ‘via patro ĵus eltrovis, ke mi estas kanajlo. Li scias nun tion kion vi sciis antaŭe’”.

“Ŝi staris en silento, aŭskultante.

“‘Li diras ke ni disiru por eterne,’ diris li.

“Ŝi ne retiris la manon.

“‘Ĉu vi fidelos al mi, aŭ ĉu vi forigos tion, kio estas probable la lastan bonan influon kiu venos en mian vivon?’

“‘John,’ ŝi kriis pasie, ‘Mi neniam forlasos vin! Neniam, neniam, ne eĉ se la tuta mondo staros kontraŭ vi’.

## La Brusto-Plato de la Judo

“Vane mi disputis kaj petegis ŝin. Estis absolute senutile. Ŝia tuta vivo estis ligita al ĉi tiu viro antaŭ mi. Mia filino, sinjoroj, estas ĉio kion mi havas por ami, kaj mi pleniĝis per angoro kiam mi vidis kiel senpotenca mi estas por savi ŝin de ruino. Mia senpotenceco ŝajne tuŝis ĉi tiun viron kiu estis la kaŭzo de mia ĉagreno.

“Eble ne estas tiel malbona kiel vi pensas, sinjoro,’ diris li, en sia kvieta, nedeturnebla maniero. ‘Mi amas Elise per amo kiu estas sufiĉe forta por savi eĉ personon kun rekordo kiel mia. Nur hieraŭ mi promesis al ŝi ke neniam plu, dum mia tuta vivo, faros mi ion pri kio ŝi sentos honton. Mi decidis tion, kaj dum mia tuta vivo ĝis nun mi neniam malsuksecis fari tion kion mi jam decidis’.

“Li parolis kun mieno konvinka. Dum li finis, li metis manon en la poŝon kaj eltiris kartonan skatoleton.

“Mi nun donos al vi pruvon de mia rezoluteco,’ diris li. ‘Ĉi tio, Elise, estos la unuaj fruktoj de via redempta influo super mi. Vi pravis, sinjoro, pensante ke mi celas la juvelojn sub via estrado. Tiaj projektoj delonge prezentis al mi ĉarmon kiu dependis tiel multe de la grandeco de la risko kiel de la valoro de la kaptaĵo. Tiuj famaj kaj antikvaj gemoj de la juda pastro estis defio al mia aŭdaco kaj mia inĝenieco. Mi decidis akiri ilin.’

“Mi divenis tion.’

“Estis nur unu afero kiun vi ne divenis.’

“Kaj kio estis tio?’

“Ke mi akiris ilin. Ili estas en ĉi tiu skatolo.’

“Li malfermis la skatolon, kaj klinŝutis la enhavon sur la angulon de mia skribtablo. Miaj haretoj leviĝis kaj mia karno malvarmiĝis dum mi rigardis. Estis dek du kvadrataj gemoj gravuritaj per mistikaj signoj. Ne povis esti dubo ke ili estas la juveloj de la Urim kaj Tummim.

“Mia Dio!’ mi kriis. ‘Kiel vi evitis eltrovon?’

## La Brusto-Plato de la Judo

“Per la anstataŭigado de dek du aliaj, faritaj speciale laŭ mia instrukcioj, laŭ kiuj la originalaj estis tiel zorge imititaj, ke mi defias la okulon rimarki la diferencon.’

“Ĉu la nunaj gemoj estas do falsaj?’ mi kriis.

“Ili estas jam de kelkaj semajnoj.’

“Ni ĉiuj staris en silento, kun mia filino pala pro emocio sed ankoraŭ tenanta la manon de tiu viro.

“Vi vidas kion mi kapablas fari, Elise,’ diris li.

“Mi vidas ke vi kapablas penti kaj restitui,’ ŝi respondis.

“Jes, dank’ al via influo! Mi lasas la gemojn en viaj manoj, sinjoro. Faru per ili kion ajn vi volos. Sed memoru ke tion kion vi faros kontraŭ mi, vi faros kontraŭ la estonta edzo de via sola filino. Baldaŭ mi kontaktos vin denove, Elise. Ĉi tiu estas la fina fojo kiam mi dolorigos vian teneran koron.’ Kaj kun ĉi tiuj vortoj li forlasis kaj la ĉambron kaj la domon.

“Mia pozicio estis terura. Jen mi kun ĉi tiuj valoregaj relikvoj en mia posedo, kaj kiel mi povus remeti ilin sen skandalo kaj malkaŝiĝo? Mi tro profunde konis la naturon de mia filino por kredi ke mi iam povus malligi ŝin de tiu viro post kiam ŝi komplete donis al li la koron. Mi eĉ ne certis kiel multe estus juste malligi ŝin se ŝi havis tiel bonigan influon sur li. Kiel mi malkaŝu lin sen vundi ŝin—kaj kiel multe justas, ke mi malkaŝu lin post kiam li volonte metis sin en mian potencon? Mi pensis kaj pensis ĝis fine mi elpensis solvon kiu eble ŝajnos al vi stulta, tamen, se mi alfrontus la saman situacion denove, mi kredas, ke tio estus la plej bona vojo je mia dispono.

“Mia ideo estis remeti la gemojn sen ke iu sciu. Per miaj ŝlosiloj mi povis enlasi min en la muzeon iam ajn, kaj mi estis certa ke mi povos eviti Simpson, kies horaron kaj metodojn mi konis. Mi decidis konfidenci kun neni—ne eĉ kun mia filino—al kiu mi diris ke mi iros viziti mian fraton en Skotlando. Mi volis plenan liberecon dum kelkaj noktoj sen demandoj pri miaj iroj kaj venoj. Tiucele mi luis ĉambron en Strato Harding tiun saman nokton, kun indiko ke mi estas presisto, kaj ke mi maldormos dum tre malfruaj

## La Brusto-Plato de la Judo

horoj”.

“Tiun nokton mi eniris en la muzeon, kaj mi anstataŭigis kvar gemojn. Estis malfacila laboro, kaj kostis al mi la tutan nokton. Kiam Simpson trapasis, mi ĉiam aŭdis liajn paŝojn kaj kaŝis min en la mumikesto. Mi konis iom la metion de oraĵfarado, sed mi estis multe malpli lerta ol la ŝtelisto. Li anstataŭigis la muntumojn tiel precize ke mi defias ke iu ajn vidu la diferencon. Mia laboro estis kruda kaj maldelikata. Tamen, mi esperis ke eble neniu zorge ekzamenos la platon, aŭ observos la krudecon de la muntado, ĝis finiĝos mia tasko. La sekvantan nokton mi anstataŭigis kvar gemojn pli. Kaj hodiaŭ nokte mi finus mian taskon, se ne pro la malbonfortuna cirkonstanco kiu kaŭzis ke mi rivelu tiel multe de tio kion mi volis kaŝi. Mi petas indulgon, sinjoroj, pro via sento de honoro kaj kompatato. Vi devas decidi ĉu vi pludiros al aliaj tion kion mi diris al vi. Mia propra feliĉeco, la estonteco de mia filino, kaj la esperoj pri la regenerado de tiu viro, ĉiuj dependas de via decido”.

“Tiu decido estas”, diris mia amiko, “ke ĉio estas bona kiu finiĝas bone, kaj ke la tuta afero finiĝas ĉi tie kaj nun. Morgaŭ la malfiksitaĵojn muntumojn fiksos sperta oraĵisto, kaj tiel pasas la plej granda danĝero, de post la detruo de la templo, kiun konis la *Urim* kaj *Tummim*. Jen mia mano, Profesoro Andreas, kaj mi nur esperas ke sub tiaj malfacilaj cirkonstancoj mi portus min tiel sindoneme kaj tiel bone”.

Nur unu piednoto al ĉi tiu rakonto. Interne de monato Elise Andreas edziniĝis al viro kies nomo, se mi estus tiel maldiskreta ke mi menciis ĝin, rekonus miaj legantoj kiel vaste kaj merite honoratan. Sed se sciiĝu la veron, tiun honoron meritas la milda junulino kiu returnigis lin, kiam li jam descendis tiel longe laŭ tiu malluma vojo de kiu malmultaj revenas.